

# I n s t r u a d o   d e   E s p e r a n t o

Prelego por la kongreso de ĈEA, 17. - 20. 10. 2019

---

Mi povas antaŭsupozi, ke vi estas bonaj esperantistoj, tial vi certe interesiĝas pri kaj ankaŭ agadas por disvastigo de Esperanto. Tio ne estas simpla proceso, ĝi konsistas el tri fazoj, etapoj, agadoj, reciproke interligitaj: Informado, instruado, utiligado. Vi certe pri tio ion legis aŭ aŭdis. UEA kaj ILEI havas ĝenerale en siaj planoj agadon en ĉi tiuj tri direktoj. Sen informado homoj, kiuj ne havis eblecon iamaniere renkontiĝi kun Esperanto aŭ hazarde renkonti iun Esperantiston, scios pri Esperanto preskaŭ nenion, eble eĉ ne tion, ke Esperanto estas lingvo. Se informado bone funkcios – ĝi devos informi ankaŭ pri eblecoj de praktika uzado – estos interesatoj por lerni la lingvon. Ni bone scias, ke Esperanto estas lingvo kun logika gramatiko sen esceptoj, do por komencantoj facile lernebla. Tamen sen lernado ne eblas posedi ĝin. Ankaŭ grave estas, ke ni ne havu multajn „eternajn komencantojn“. Necesas daŭrigi la lernadon, kio jam ne estas tiom facila. Tiam la komencintoj, sed eble ankaŭ komencantoj povas pripensi: „Kial mi lernu Esperanton?“ Respondon je ĉi tiu demando donos al ili praktika uzebleco, utiligado de la lingvo. Ĉu ĝi estas sufiĉe alloga, laŭ la nuna stato? Dependas de tio, kion kiu elektos kaj kiom taksos eblecojn, kiujn scio de Esperanto nun ofertas. Do, pri tio ne necesas ĉi tie paroli, ĉar ni ĉiuj konas la diversajn eblecojn. Tamen estas certa manko en fakaj sferoj. Estas ĝenerale konata la eldiro: *Se vi volas perlabori monon, lernu la anglan, se vi volas trovi amikojn, lernu Esperanton*. Finfine, ankaŭ amikoj povas helpi en la fakaj aferoj. Ĉi tie estas ia sorĉita cirklo: Se estos uzebleco de Esperanto pli granga, estos pli granda intereso lerni ĝin. Sed por tio necesas pli multe da Esperantistoj kaj inter ili pli da fakuloj pri diversaj fakoj. Do, por tio necesas, ke amasoj lernu Esperanton, por kio necesas vigla kaj vasta informado. La plej bona rimedo, kiel atingi amasan lernadon de Esperanto, estas enkonduko de instruado de Esperanto en lernejojn. Kaj pri tio mi nun volas paroli.

Ni rigardu situacion en nia respubliko, kiu ne estas tro ĝojiga. Pri infana kurso mi scias nur pri unu de Jana Melichárková, sed la nunan staton mi ne konas. En Lančov nun estas pli instruataj aliaj lingvoj ol Esperanto. Pli sukcesaj estas kursoj en Bartošovice. Ankoraŭ eblas nomi tri pluajn kaj pli sukcesajn kursojn: Seminarioj en Skokovy, kiujn gvidas s-anino Jindřiška Drahotová, poste du kursoj en Prago: de Vít Guiglielmo Mišurec kaj kurso por triaĝuloj de Petro Chrdle. Ĉi tiuj tri kursoj estas troveblaj inter kursoj en Kursejo de ret-paĝoj edukado.net. [1] Ĉu ankoraŭ funkcias kursoj en Česká Třebová, Svitavy kaj Okříšky, mi ne scias. Enkonduki E-kurson en lernejo estas pli malfacile. Se la kursgvidonto estas instruisto en la lernejo, tio estas pli irebla vojo. Kiam mi ankoraŭ instuis en Pedagogia fakultato de Masaryk Universitato en Brno, mi provis kun subteno de loka instruisto instrui Esperanton en fakultata bazlernejo. Aliĝis 5 gelernantoj, el ili baldaŭ restis nur du kaj gepatroj de unu knabino, kiu entuziasme vizitadis la kurson, transloĝiĝis pli malproksimen de la lernejo kaj ŝi devis alveturadi kaj tial ŝi ne plu havis tempon vizitadi la lecionojn, do la kurso finis.

Kiam mi laboris en PdF, venis de edukadministerio postulo por proponoj de evoluigaj projektoj. Mi preparis projektojn por instruado de Esperanto por komencantoj, daŭrigan kurson kaj kurson por klerigkibernetiko. En la daŭrigan kurson mi havis enkalkulitan someran ferian kurson en Lančov, kiun sukcesis partopreni du studentoj. Klerigkibernetikon mi sukcesis instrui nur dum unu semestro, ceterajn kursojn mi instruis dum kelkaj lernojaroj, ankaŭ kiel pensiulo. Sed poste la estraro de la fakultato ne havis intereson pri instruado de

Esperanto kaj ne plu estis financa subteno de la kursoj el la projektoj kaj mi devis fini. Ankaŭ dum du lernojaroj mi instruis Esperanton laŭ peto de vicdekano en Natursciencia fakultato de Palacký Universitato en Olomouc. Poste jam kiel pensiulo mi sukcesis instrui studobjektojn Esperanto I, Esperanto II kaj Interlingvistikon en Katedro de lingvistiko kaj baltistiko de Filozofia fakultato de MU en Brno. Ĉiujn ĉi tiujn universitatajn kursojn mi instruis kiel nedevigaj studobjektoj. Post sukcesa trapaso de finekzameno la studentoj ricevis poentojn. Esperanton mi instruis laŭ videokurso Mazi en Gondolando. Sed tio ne plaĉis al estro de la katedro kaj mi devis post 2,5 jaroj fini.

Kia estas ĉe ni situacio en instruado de lingvoj en baz- kaj mezlernejoj kaj kian perspektivon havas ĉe ni instruado de Esperanto en lernejoj? Ĉu bazaj, ĉu mezgradaj ĉu universitatoj. [2] De la lernojaro 2013/2014 estas en niaj bazlernejoj devige instruata la dua fremdlingvo, kiun la lernantoj devas regi je la nivelo A1 laŭ KER (Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj). Se la unua fremdlingvo ne estas la angla, ĝi devas esti la dua. Plimulto de lernejoj elektas kiel la unua fremdlingvo ĝuste la anglan kaj la dua povas esti libervola lingvo. Lernejoj ofte elektas tiun pluan el mondlingvoj – la germanan, la francan, la hispanan, la rusan, la italan. Venas do demando, ĉu la dua fremdlingvo povas esti ankaŭ Esperanto? Ĉi tion esploris s-ano Viktor Dvořák kaj de Ministerio de edukado ricevis pozitivan respondon. Surbaze de tio estis laŭ postulo de la Ministerio prilaboritaj Standardoj por instruado de Esperanto kaj ekzemplo de instruplano laŭ lernolibro de Stano Marček: Esperanto laŭ rekta metodo. Sed ĉiu instruisto povas elekti lernolibron laŭ propra konsidero kaj prepari propran instruplanon.

Ekzistas lernantoj, kiuj kapablas malfacile lerni ĉeĥan lingvon kaj la unua fremda lingvo (la angla) estas ĉe limo de iliaj kapabloj, la dua fremdlingvo jam transpaŝas ĝin. Por ili estus bona solvo lerni kiel la duan fremdlingvon Esperanton. Kompreneble, ankaŭ por pli lingve kapablaj lernantoj estus lernado de Esperanto bonvena, ĉar ĝi prefere pro logika gramatiko sen esceptoj estas pli facila por lerni. El ĉi tiu vidpunkto estas neniu malhelpilo por enkonduko de instruado de Esperanto kiel la dua fremdlingvo. Nun ni rigardu la problemon el praktika vidpunkto. De kio dependas elekto de la dua fremdlingvo, ĉi kaze Esperanto? Pri tio decidis direktoro de lernejo surbaze de deziroj de gelernantoj, pli precize de iliaj gepatroj. Ĉu volos gepatroj, ke iliaj infanoj lernu Esperanton? Ekzemple en Lančov oni klare vidas, ke infanoj, kiam tie renkontiĝas kun Esperanto, emas lerni ĝin, sed surbaze de decido de iliaj gepatroj tio ne eblas kaj ili devas daŭrigi en lernado de lingvo, kiu estis antaŭe elektita. Eĉ se tia kondiĉo estos plenumita kaj direktoro de lernejo volus elekti Esperanton, ekzistas ankoraŭ unu kondiĉo por la elekto: Direktoro devas havi je dispono instruiston kun aprobo por instruado de Esperanto, ĉar temas pri lerneja instruado kaj ne pri instruado en interesrondeto. Kiom da tiaj instruistoj estas ĉe ni? Mi aŭdacas aserti, ke neniu. La aprobon eblas akiri per studado en universitato kaj en nia respubliko en neniu universitato oni edukas instruistojn de Esperanto. Tia edukado okazas en Pollando en Adam Mickieviĉ Universitato en Poznano [3], kie ekzistas trijara postdiploma studado de interlingvistiko, kiu komenciĝas ĉiun trian jaron kaj en la tria studjaro eblas elekti branĉon por instruado de Esperanto. Ĝin eblas studi ankaŭ memstare, sen studado de interlingvistiko. Laŭ mia scio el Ĉeĥio neniu trapasis ĉi tiun porinstruistan studadon. Ekzistas ankaŭ ITE – Instruista Trejnado de Esperanto, ekzemple en Germanio en Esperanto-urbo Herzberg am Harz aŭ en retpaĝoj de edukado.net. Iom limigitaj ITE okazas enkadre de iuj E-kongresoj. Sed ĉu tio sufiĉos por direktoro, ke li akceptu instruiston trapasitan ITE? Tamen ni ne estu tiom skeptikaj. Estas ebleco, ke Esperanton povas instrui ankaŭ instruistoj aprobitaj por aliaj lingvoj, kiuj tamen havas sperton pri instruado de lingvo.

Laŭ ĉi tiu ideo (sed ne nur) estas solvava dujara projekto Multlingva akcelilo, pri kiu aperis artikoloj en kelkaj numeroj de Eŭropa Bulteno. Mi nun konatiĝos vin pri ili.

La unua informo pri la projekto aperis en la Eŭropa Bulteno, Januaro 2018, No 177 [4] de D-ro Seán Ó Riain, prezidanto de EEU:

### MULTLINGVA AKCELILO – UNUA RENKONTIĜO EN ZAGREBO

La unua renkontiĝo de la 9 partneraj organizaĵoj kiuj prilaboras la EU-projekton Lingva Akcelilo okazis en Zagrebo de la 10-a ĝis la 11-a de januaro 2018. Temas pri aparte grava projekto, kiel mi sube provos klarigi.

**Multlingva Akcelilo** estas dujara projekto aprobita fare de EU por plibonigi kaj plirapidigi lingvolernadon ĝenerale. Tiucele ĝi uzas materialon ellaboritan por la Zagreba Metodo por lerni Esperanton. La celo de Multlingva Akcelilo estas prepari instrumaterialojn por plej rapide paroligi la lernantojn. Tiel ĝi uzas severe limigitan kvanton da materialo, kaj forigas ĉiun balaston kiu povus malrapidigi la lernadon.

Multlingva Akcelilo nun elektis la 242 plej oftajn morfemojn el morfemaro de 467 morfemoj formulitaj de Zlatko Tišljar, por esti lernataj fare de bazlernejaj infanoj en lernejoj en Kroatio, Slovenio, Slovakio kaj Bulgario. La januaran kunsidon ĉeestis instruistinoj el tri landoj, kaj aliaj kunlaborantoj el Germanio, Slovakio, Danio kaj Irlando. La plimulto de la instruistinoj ne parolas Esperanton, sed ili konsentis kunlabori por eltrovi didaktikan aliron al lingvolernado bazita je la Zagreba Metodo por lerni Esperanton. Okazis tre detala diskuto pri la laborprogramo por la venontaj du jaroj. La partopreno de ne-esperantistoj en la projekto, kvankam ĝi iom komplikas la komunikadon, povos helpi eltrovi aliron al lingvolernado kiun povos uzi eĉ instruistoj kiuj ne parolas Esperanton.

Kelkaj ecoj de la strukturo de Esperanto igas ĝin aparte taŭga por la plirapidigo de lingvolernado ĝenerale. Ni menciuj la fakton ke la morfemoj de Esperanto estas neŝanĝeblaj kaj libere kombineblaj, kaj ankaŭ la fakto ke tiuj morfemoj uzeblas kiel sendependaj vortoj, kiel en la ĉina lingvo. Neniu hindeŭropa lingvo havas tiujn trajtojn, kaj aparte gravas ke lingvoinstruistoj tra la EU-landaro eksciuj tion.

Lingvolernado en EU estas en krizo: ekde la Eŭropa Konsilio de Barcelono de 2002 la oficiala celo de EU estas ke ĉiu EU-civitano lernu almenaŭ tri lingvojn – la denaskan kaj du aliajn. Pli kaj pli klaras ke la dominado de la angla en instrusistemoj rekte malhelpas la EU-celon, ĉar ĝi prenas troan lernotempon kaj samtempe malpliigas la motivadon lerni trian lingvon. **Surveylang**, organizita fare de la Eŭropa Komisiono en 2012, science montris tiun fakton, kaj la mankon de sukcesa lingvolernado. Ekzemple, Surveylang eĉ ne ekzamenis homojn je la 2 superaj niveloj, C1 kaj C2. Mi demandis kial, kaj la respondo estis „ĉar la kvanto da lernantoj kiuj atingis la C1-nivelon en la unua fremdlingvo – ni lasu sen mencio la pli superan C2-nivelon – estas statistike nesignifa, proksimume 1%“. La tiel-nomataj „ekspertoj de lingvolernado“ kiuj ne konas Esperanton, neniel povos plibonigi la situacion. Do, endas Multlingva Akcelilo!

Tuj post ĉi tiu artikolo sekvas priskribo de la projekto de Zlatko Tišljar [4]:

### KOMENCIĜIS DUJARA EŬROPA PROJEKTO „MULTLINGVA AKCELILO“

La projekton finansas Eŭropa Komisiono pere de sia programo Erasmus+. La projekton gvidas Zagreba eldonejo IZVORI (Fontoj) kaj en Zagrebo kunpartneras ankaŭ la elementa

lernejo el Retkovec. En la projekto kunaktivis pliaj 7 partneroj, tri el Slovenio kaj po unu el Slovakio, Germanio, Danio kaj Bulgario. Inter ili estas 2 universitatoj kaj 3 elementaj lernejoj.

La projekto formale startis komence de novembro 2017 kaj devas finiĝi fine de decembro 2019. La realan starton efektive prezentis la unua renkontiĝo de po du reprezentantoj de ĉiuj partneroj kiu okazis de la 10-a ĝis la 11-a de januaro 2018 en Zagreba hotelo Palace. Ĉeestis 18 reprezentantoj de ĉiuj partneroj.

La projekto devas produkti lernprogramon por nova volontula lernobjekto por triaklasanoj de bazaj eŭropaj lernejoj (antaŭ enkonduko de dua fremdlingvo – ĉar la unuan fremdlingvon nuntempe, kutime la anglan, oni enkondukas plej ofte jam en la unua klaso. Per tiu ĉi lernobjekto oni grave plirapidigas la lernadon de dua kaj postaj lingvoj (25 – 30 %). Oni produktos didaktikajn rimedojn por Multlingva akcelilo kiuj uzos maksimume modernan informadikan teknologion. La bazo estos portalo por instruistoj kaj gelernantoj. Kompletan novaĵon prezentos ellaboro de generilo de demandaj frazoj kiujn kreos komputilprogramo kaj ĉiutage demandas la gelernantojn per demadoj konsistantaj nur el vort- kaj gramatikelementoj lernitaj ĝis tiu momento.

Tiel krom la du lernohoroj en la lernejo semajne la gelernantoj lernos interaktive ĉiutage ricevante dekon da demandoj al kiuj ili devos skribi respondi. Ili tiel ekzercos la lernitaĵojn por ne forgesi ilin kaj praktikos la lingvon ĉiutage. La plimulto de la ekzercoj estos ligitaj al la portalo kaj la gelernantoj devos uzi kaj en la lernejo kaj hejme komputilon aŭ tabletkomputilon.

La dua parto de la projekto estos elprovado de tiu didaktika materialo dum 2-monataj kursetoj, kiujn en 4 bazaj lernejoj gvidos tieaj fremdlingvo-instruistoj, kiuj mem paralele kun la gelernantoj lernos Multlingvan akcelilon. La esenco de tiu enkonduka lernobjekto kiu pli poste akcelos grave la lernadon de dua kaj 3-a fremdlingvo, sed ankaŭ la komprenon de la propra gepatra lingvo estos parteto de Esperanto kiu estas plej logike gramatike strukturita lingvo. Antaŭe faritaj eksperimentoj pri tiel nomata propedeŭtika rolo de Esperanto montris ke 240 plej oftaj morfemoj de Esperanto kovras 80% de praktika parola lingvo kaj tio estas plej oftaj leksikaj kaj gramatikaj morfemoj de Esperanto. El ili eblas produkti milojn de uzeblaj kaj tuj praktikataj E-vortoj en ĉiutaga lingvo. Baze de la plej oftaj 500 morfemoj estis farita baza lernolibro de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo kies unuan duonon oni ankaŭ uzas en la projekto.

Kaj la lasta nekutima celo de la projekto estas ke la Lingvan Akcelilon animacie gvidos instruistoj kiuj ne konas Esperanton, sed faras tion nur baze de instrukcioj en la portalo kaj tiel ne necesos krei apartan instruistaron. La elementa didaktika materialo kaj la du unuaj instrumonatoj okazos jam antaŭ la fino de la lernojaro 2017/2018 do antaŭ la someraj ferioj kaj la partneroj okazigos en septembro la duan partnerrenkontiĝon en Bratislavo kie oni diskutos la spertojn de tiu fazo de la proekto. Post tio la partneroj ellaboros definitivan didaktikan materialon por la tuta unujara lernobjekto el 64 lernohoroj.

Plia artikolo pri la projekto de Z. Tišljar aperis en Eŭropa Bulteno el Majo 2018, No 181 [5]:

#### KONTROLA VIZITO AL LERNEJOJ EN KIUJ ESTAS INSTRUATA ESPERANTO

En majo 2018 mi, kiel ĉefaŭtoro de la ideo pri eŭropa projekto Multlingva Akceliko, interkonsentis kun du elementaj lernejoj en Zagrebo (Kroatio) kaj Ŝentilj (Slovenio) viziti la instruohorojn pri Esperanto. La projekto en sia unua jaro antaŭvidis provan instruadon de unu

triono de la propedeŭtika kurso de Esperanto (Multlingva Akcelilo) en tri elementaj lernejoj en Kroatio, Slovenio kaj Bulgario (Vraca) kiu okazis en marto, aprilo kaj majo gvidataj de lernejoj instruistinoj pri fremdlingvoj, kiuj ne konas Esperanton. Ili instruas laŭ la instrukcioj de la projekto uzante didaktikaĵojn kiuj por tio estis kreitaj. La plano estas ke post tio la instruistinoj raportu pri siaj rimarkoj: kio en la kurso tre bone funkciis, kio malpli kaj kio eventuale ne estas efektivebla. Tiujn raportojn oni pridiskutos en la dua renkontiĝo de projektpartneroj en Bratislavo la 20-an de septembro kaj baze de ili kreas definitivan version de la didaktikaĵoj por la instruprogramo.

Mi ne povis iri al Bulgario, sed mi vizitis la kursojn post 10 unuaj lernohoroj en Zagrebo kaj Ŝentilj. Mi estis tre kontenta pri la maniero kiel faras tion la instruistinoj kaj pri la rezultoj. En Zagrebo ĉio estis bonega, sed en Ŝentilj la infanoj havis problemon pri parkerado de novaj vortoj – unu el la centraj problemoj de ĉiu fremdlingva instruado. Zagrebanoj aplikis tre bonan manieron solvi tion, kion ni enmetos en ĉiujn estontajn kursojn. Aliajn rimarkojn kaj diskutindaĵojn mi aperigos post kiam mi ricevos skribajn raportojn de ĉiuj tri lernejoj.

La sekva artikolo pri la projekto de Zlatko Tišljar estis publikigita en Eŭropa Bulteno No 184, septembro 2018 [5]:

### MULTLINGVA AKCELILO MARŜAS LONGPAŜE

La 20-an kaj la 21-an de septembro okazis la dua labora konferenco de ĉiuj partneroj en la projekto Multlingva Akcelilo financata de Eŭropa Unio. Ĝi okazis en Bratislavo (Slovakio) kun partopreno de 15 reprezentantoj el 6 landoj. Kiel ni jam raportis, la projekton decidis financi fondaĵo de Eŭropa Komisiono Erasmus+ per 250.000 eŭroj. La celo de tiu ĉi projekto estas krei didaktikajn rimedojn por nova lerneja lernobjekto kiu dum unu jaro estus instruata al 9-jaraj infanoj en eŭropaj elementaj lernejoj. Tiu lernobjekto celas evoluigi en infanoj apartan konscion pri lingvoj ĝenerale kiu grave plirapidigos iliajn postajn lernadojn de fremdlingvoj. La projekto startis en novembro 2017 kaj finiĝos en decembro 2019, kiam la didaktikaĵoj devos esti je dispono por ĉiuj elementaj lernejoj en EU. La Multlingva Akcelilo, 64-hora instruobjekto, baziĝas je tre elementa Esperanto.

La projekto havas 2 revoluciajn tute novajn celojn kaj aspektojn:

Oni kreas lernobjekton per kiu infanoj kaj gepatroj ĝue kaj lude eniras la esencon de lingvoj. La unua revolucia aspekto estas, ke la lernobjekton instruos lingvoinstruistoj, kiuj neniam antaŭe lernis Esperanton. La dua revolucia aspekto estas, ke oni ne instruos Esperanton kiel tutecan lingvon, sed nur minimumon uzatan en praktiko (el 200 morfemoj) kiu tamen ebligas, ke la infanoj la lingvon ekparolu, ĉar temas pri la plej oftaj elementoj uzataj.

Por atingi la veran celon, ke la infanoj, kiuj ankoraŭ konas nenion pri gramatiko, akiru rapidigitan kapablon lerni fremdlingvon, oni devas post unujara lernado atingi, ke ili tiom regu praktikan uzon de la lingvo, ke ĝi kreu en ili klaran komprenon pri gramatikaj strukturoj ĝenerale kaj disponigu iom pli ol 100 vortojn, kiuj ĉefe venas el la latina fonto kaj helpas lerni aliajn eŭropajn lingvojn kun forta latina fono, kiel la angla kaj romanidaj lingvoj. Do diference de aliaj didaktikoj, kiuj instruas grandajn kvantojn da materialo (1000 - 2000 vortoj) kaj preskaŭ la tutan gramatikon, kaj kiuj kutime atingas rezultojn nur pri pasiva lingva kono, sed ne povas atingi paroladon de la lingvo dum nur unu jaro (2 lernohoroj semajne), la Multlingva Akcelilo evoluigas didaktikajn rimedojn por preskaŭ nura instruado de parolkapablo. Ambicio ĝis nun neniam atingita.

La unua fazo de la projekto estis testi la evoluintajn materialojn dum du monatoj al infanoj en tri elementaj lernejoj de tri landoj. La celo estas konstati kiom tiuj novaj materialoj estas efikaj kaj ĉu

per ili vere eblos atingi parolkapablon dum unu jaro al relative grandaj lernantogrupoj (meze 14). La septembra kunsido ĉefe analizis la rezultojn de tiu testa instruado, kiu okazis de aprilo ĝis junio 2018 en Zagrebo (Kroatio), Ŝentilj (Slovenio) kaj Vraca (Bulgario). En la tri kursoj 5 lingvoinstruistinoj (3 el ili de la angla) instruis al 40 infanoj.

La baza konstato estas, ke la kurson kun entuziasmo akceptis ĉiuj gelernantoj kaj ĉiuj iliaj gepatroj kaj la instruistoj, kiuj lernis elementojn de Esperanto paralele kun la infanoj. Ĉiuj opinias tion la ĉefa atingiĝo, tiel ke eĉ se en la fina fazo oni ne sukcesus atingi parolkapablon de ĉiuj infanoj, oni atingis entuziasmon por tiu lingvo kaj deziron plulerni ĝin. Laŭ la projektpiano neniu lernejo devas plu daŭrigi la kurson post la testfazo, sed ĉiuj faros tion pro la deziro de ĉiuj 3 grupoj (instruistoj, infanoj kaj iliaj gepatroj).

Dum la kunsido oni akceptis diversajn ŝanĝojn en la didaktikaĵoj baze de rimarkoj de la geinstruistoj (ĉiuj 5 ĉeestis en Bratislavo) kaj tiel fiksitis definitive la modelon de la didaktikaĵoj por la tuta kurso kaj la partneroj en la dua fazo finproduktos didaktikajn rimedojn ĝis la jarfino 2018 por la tuta kurso. La kursoj estos daŭrigataj paralele kun la evoluado de la didaktikaĵoj kaj komplete finiĝos en majo 2019. La tria fazo estos ellaboro de detala platformo kun instrukcioj kiel uzi tiujn didaktikaĵojn (aplikante la plej modernajn informadikajn rimedojn) en 6 lingvoj de la partneroj. Fine de la sekva jaro troviĝos je dispono granda portalo kun tiuj materialoj kaj priskribo de la lernobjekto kaj la portalon povos uzi kaj la geinstruistoj kaj la infanoj.

Estas tre multaj interesaj elementoj de tiuj didaktikaĵoj pri kio ni skribos aliffoje.

El la priskribo de la projekto evidentas, ke ĝi estos la vera multlingva akcelilo, ne nur laŭ la nomo de la projekto. Ĝi devos entuziasmigi Eŭropan komisionon kaj ĝi senprobleme povos rekomendi ĝian akcepton al edukministerioj de unuopaj ŝtatoj de EU. Kiam edukministerioj rekomendos envicigi la Akcelilon en instruplanojn de lernejoj, certe lernejdirektoroj akceptos ĉi tiun helpilon por lernado de lingvoj, des pli, ke ili ne devos dungi pluajn instruistojn. Kaj se ĝi povos esti ankaŭ finance subtenita, eble eĉ de EU, nenio baros ĝian disvastigon. Ĉar temas nur pri bazaj scioj de Esperanto, precipe parolaj, estos necese interesigi infanojn pri daŭrigo en lernado.

#### FINE NI RIGARDU SITUACION AN ALIAJ EŬROPAN LANDOJ.

Dum lastaj jaroj estis akceptitaj kaj solvataj kelkaj projektoj sub programoj Comenius, Grundvig kaj nun ekzistas nur programo Erasmus+, financataj de Eŭropa Unio. En programo Comenius partoprenis gimnazio el Herzberg, Germanio, kun partneroj el Italio kaj Hungario. En alia plurlanda projekto enestis Bulgario, Litovio, Italio kaj Rumanio. En lerneja hejmpaĝo [13] estas mallonga raporto. En programo Grundvig partoprenis lernejoj el Germanio, Francio, Katalunio kaj Svislando [12]. Nomo de la projekto estis „Ideo“. Krom lernado de Esperanto la gelernantoj konatiĝadis dum reciprokaj vizitoj kun vidindaĵoj kaj kulturo de iliaj alilandaj samaĝuloj enkadre de solvo de la ĉefa tasko de la projekto – interkulturo. Inter rezultoj de la projektoj estis multlingvaj retpaĝoj pri la projektoj.

En **Hungario**, kiel certe multaj scias, estas Esperanto egalrajta kiel ceteraj fremdaj lingvoj. Tiam studentoj de universitatoj, kiuj devas havi ŝtatekzamenon el du fremdaj lingvoj, ofte elektas kiel la dua fremda lingvo ĝuste Esperanton, ĉar ili povas pli facile lerni ĝin. Tamen tio ne tiom multe fortigas E-movadon en Hungario, ol oni povas supozi, ĉar la finstudintoj ne trovas sufiĉe da faka aplikado. En universitato ELTE (Eötvös Loránd Tudományegyetem) fondis en la jaro 1966 profesoro István Szerdalelyi Esperanto-fakon [6], kies lekcianto li estis ĝis sia morto en la jaro 1987. Poste la fakon gvidis [Varga-Haszonits Zsuzsa](#). La fako funkciis

ĝis la jaro 2006. Tamen en la fako estis formitaj elstaraj esperantistoj, kiel ekzemple Katalin Kováts – redaktorino de reta portalo edukado.net, Ilona Koutny – gvidantino de interlingvistikaj studoj en Poznano, Pollando, [Zsófia Kóródy](#) gvidantino de ICH (Interkultura Centro) kun Peter Zilvar en Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt/ la Esperanto-Urbo en Germanio.

En **Slovakio** estas fame konataj SES-oj (Somera Esperanto Studado) [7], kiuj ĉiujare allogas multe da partoprenantoj, inter ili sufiĉe da gejunuloj kaj eksterlandanoj. En Partizánske havas sidejon organizo E@I (E ĉe I), kiu realigas diversajn lingvajn projektojn, kiuj helpas al [Esperanto-parolantoj](#) uzi la [interreton](#) por tutmonde [kunlabori](#), informi pri [Esperanto](#) kaj instrui ĝin. Kunodiganto estas Peter Baláž, kiu zorgas pri projektplanado.

Pri **Pollando** estis mencio jam komence de la prelego [3]. En Universitato Adam Mickiewicz en Poznano funkcias de la jaro 1997 postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj sub la gvido de profesorino [Ilona Koutny](#). La studoj estas trijaraj kaj komenciĝas ĉiun trian jaron. En la studoj instruis ĉirkaŭ 25 profesoroj kaj spertuloj. En la tria jaro estas inter specialiĝoj instru-metodiko proponata ankaŭ kiel aparta kurso. Ĉi tiun Instruistan Trejnadon gvidas Katalin Kováts.

En **Germanio** portas la urbo Herzbrg am Harz kromnomon Esperanto-Urbo [8]. La [20-an de novembro 2004](#) estis en la urbo malfermita Interkultura Centro kun mallongigo ICH [14]. Ĝia multflanka laboro sub gvido de [Peter Zilvar](#) kaj Zsófia Kóródy kaŭzis, ke la urba konsilantaro unuanime decidis aldoni la kromnomon al la urbonomo. ICH mem kaj kiel oficiala partnero de Herzberg am Harz, en kunlaboro kun la urba administracio zorgas pri la konstruado de Esperanto-infrastrukturo, Esperanto-servoj en la urbo. Por la konstruado de Esperanto-urbo Interkultura Centro Herzberg servas kiel metiejo por planado, tradukado, grafika laboro, produktado, projektoj.

ICH en la Esperanto-domo ĉiusemajne organizas kunsidojn de Esperanto-klubo, Esperanto-kursojn por komencantoj, daŭrigantoj kaj perfektigemuloj. La biblioteko estas vizitebla kaj por esperantistoj kaj por alilingva publiko, servas la lernejan Esperanto-instruadon kaj ofertas ankaŭ germanlingvajn prelegojn pri [Esperanto](#) kaj neesperantaj temoj. Regule starigas Esperanto-informbudojn, tablojn dum urbaj festoj, eventoj, flegas la kontakton kun aliaj lokaj kluboj, asocioj, partoprenas en lokaj, landaj kaj internaciaj projektoj, organizas prelegojn, prelegvojaĝojn, reprezentas la urbon en internaciaj renkontiĝoj, konferencoj, kongresoj.

ICH ofertas siajn servojn, organizas eventojn dum la tuta jaro. Ĝi servas Esperanto-parolantajn vizitantojn, turistojn, rekomendas tranoktejojn, ekskursojn, urbogvidadon, zorgas pri staĝantoj, helpantoj. Zorgas pri la informado pri Esperanto kaj Esperanto-eventoj por la regiona, landa kaj internacia gazetaro, publike prezentas novaĵojn en la urbocentra inform-vitrino kaj per afiŝoj. Esperanto-angulo en la muzeo de [Kastelo Herzberg](#) ankaŭ helpegas al la disvastigo de konoj pri la Lingvo Internacia. ICH okupiĝas ankaŭ per eldona agado.

En **Francio** multaj esperantistoj konas, almenaŭ laŭ nomoj, kastelon Greziljono [9] kaj Esperanto-Centron Kvinpetalo en [Bureso](#) apud [Puatiero](#). Kastelo Greziljono situas 250 km sudokcidente de [Parizo](#) en la okcidenta [Francio](#). La senprofitcela kooperativo „Kulturdomo de Esperanto“ fondita en [1951](#) de [Henri Micard](#), posedas la kastelon kun 18-hektara parko. La kastelon vizitas ofte lernantoj de Esperanto el la tuta mondo, precipe dum la somero kaj la francaj lernejoj ferioj. Tie okazas vico de regulaj kaj laŭokazaj aranĝoj.

Esperanto-Centron Kvinpetalo [10] kreis en 1985 kelkaj sindonemaj esperantistoj, ĉefe francaj. Tie estas organizataj kursoj prilingvaj, staĝoj diverstemaj (literaturo, astronomio,

botaniko, komputiko...) en somero kaj en pluraj feri-periodoj dum la tuta jaro en vilaĝaj domoj.

Kiel aspektas instruado de Esperanto en lernejoj en Francio, pri tio oni povas legi en artikolo publikigita en Eŭropa Bulteno, Novembro 2018, No 186 [11]:

#### LISTIGU E-KURSOJN EN LERNEJOJ EN EDUKADO.NET

En februaro 2017 la Franca Ministerio pri Edukado oficiale sciigis apartan komisionon de Esperanto-Francio, ke eksperimenta Esperanto-instruado povas jam ekkazi, kie lernejestroj bonvolos (legu raporton pri la agado en la revuo Esperanto, junio 2017, p. 143). Notinde estas, ke post maksimume kvinjara taksado la ministerio pripensos plivastigi la enkondukon de nia komuna lingvo en la francan edukadan sistemon, se sufiĉe da gelernantoj kaj instruistoj montriĝos interesataj lerni kaj instrui. Kompreneble, endas sukcesigi tian (eble) decidigan okazon por nia movado! Sekve, ekde septembro 2017, Esperanto estis enkondukita en 13 lernejojn, bazajn aŭ mezajn kaj instruita al 266 gelernantoj. Rezulte, jam fine de la lernejo-jaro 2018 kelkaj komunikaĵoj okazis inter lernejoj de malsamaj landoj. Tamen, la franca ministerio informis nin ke tio «ne sufiĉas»: do, tiuj nombroj devas plialtiĝi. Tial, por kuraĝigi pli da lernejestr(in)oj, geinstruistoj kaj gelernantoj partopreni la eksperimenton, estus ege alloga, ke ni povu pruvi ke Esperanto estas instruata ankaŭ en kiel eble plej multaj lernejoj kaj landoj. Ju pli tio eblus des pli tia eksperimento iĝos altira, ne nur en Francio sed, espereble, ankaŭ en Eŭropo. Tiucele estas lanĉita grava alvoko, por ke ĉiu Esperanto-instruanto/isto en eŭropaj lernejoj enskribiĝu en la nura oficiala listo kaj mapo disponeblaj ĉe Edukado.net. La ĝisdatigon de tiu listo eblas fari ĉe: <http://edukado.net/kursejo>.

La franca komisiono «Esperanto-ĉe-abituro»: Alexandre André, Guy Camy, Maurice Jux.

Esperanto estas instruata ankaŭ en aliaj lernejoj en pluraj landoj, kiuj ĉi tie ne estis menciitaj. Trovi ilin eblas (se ili estis tien enskribitaj) en retpaĝo Kursejo de edukado.net [1], kie estas ebleco serĉi la kursojn laŭ diversaj kriterioj.

Fontoj:

- 1) <https://edukado.net/kursejo>
- 2) <http://www.literatura.bucek.name/ilei/druhyjazyk.html>
- 3) <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/index.html>
- 4) <http://www.europo.eu/documentloader.php?id=473&filename=eb-177-2018-01.pdf>
- 5) <http://www.europo.eu/documentloader.php?id=479&filename=eb-181-2018-05.pdf>
- 6) [https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-instruado\\_ĉe\\_ELTE](https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-instruado_ĉe_ELTE)
- 7) [https://eo.wikipedia.org/wiki/Somera\\_Esperanto-Studado](https://eo.wikipedia.org/wiki/Somera_Esperanto-Studado)
- 8) [https://eo.wikipedia.org/wiki/Herzberg\\_am\\_Harz](https://eo.wikipedia.org/wiki/Herzberg_am_Harz)
- 9) [https://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo\\_Greziljono](https://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo_Greziljono)
- 10) <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kvinpetalo>
- 11) <http://www.europo.eu/documentloader.php?id=494&filename=eb-186-2018-11.pdf>
- 12) <http://www.noos.ch/ideo/bonvenon.php?L=eo>
- 13) <http://www.gymnasium-winterberg-medebach.de/aktivitaeten/projekte/comenius/209.html>
- 14) [https://eo.wikipedia.org/wiki/Interkultura\\_Centro\\_Herzberg](https://eo.wikipedia.org/wiki/Interkultura_Centro_Herzberg)